



Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Junio : 4 2022

PLENDO KONTRAŬ LA FILO MEM, ĈAR ILI DEZIRAS HAVI NEPON

Sanjev kaj Sadhana Prasad, sesdekjaraĝa barata paro, plendis ĉe tribunalo de Haridwar, en la ŝtato Uttarakhand (Barato), kontraŭ sia filo mem, pro la fakto, ke li edziĝis antaŭ ses jaroj kaj li ankoraŭ ne havas idaron. Laŭ s-roj Prasad, tio povus esti taksata kiel perfido, pro tio ili postulas mon-kompenson de 650.000 usonaj dolaroj, se la dezirata infano ne naskiĝas dum la kuranta jaro.

La paro deklaris, ke dum la vivo de la filo, ili pagis liajn studojn kaj multekostan geedziĝon, do, ili rajtas ricevi kompenso la amon de ebla nepo. Tamen, li ankoraŭ ne naskiĝis kaj tio ne okazis pro problemo de la geedzoj, sed pro ilia libera decido.

La advokato de la familio asertas en la plendo, ke la gepatroj elspezis multe da mono por certigi taŭgan edukadon de la filo. Tiel, nun venas la momento ricevi la rezulton de tiu investo, pere de la amo de ebla nepo. La familio multe suferas, ĉar najbaruloj kaj konatuloj malŝate ridindigas ilin pro la manko de idaro.



› Ges-roj Sanjev kaj Sadhana Prasad plendis kontraŭ sia filo mem, ĉar ili deziras fariĝi geavoj.

Laŭ la pledantoj, la revo de ĉiuj gepatroj estas fariĝi geavoj, do ili jam atendas de antaŭ kelkaj jaroj la plenumon de tiu revo. Ili ade klopodis konvinki la filon kaj bofilinon, tamen ambaŭ rifuzas tiujn petojn kaj tio kaŭzis grandan damaĝon al ili. Laŭ ili, la gejunuloj eĉ rompis ilian koron, pro la fakto, ke verŝajne ili mortos antaŭ ol koni sian nepon kaj tio povus esti taksata kiel kruelaĵo kaj mensa torturo.

Antaŭtempe en Barato, ofte kelkaj generacioj loĝis ĉe sama domo. Tamen, lastatempe multaj gejunuloj liberigis sin el tiu kutimo kaj ili havas sian propran loĝejon fore de la tradicia familio.

Vorto de la Semajno

Atenci: Provi mortigi iun, kiun oni devus respekti.

Provi detruĵi aŭ difekti ion, garantiitan de la leĝoj

Atenco: Ago de tiu, kiu atencas.

Seksatenco: Leĝe punata provo havi seksajn rilatojn kun iu persono kontraŭ ties volo.



La atenco kontraŭ Franz Ferdinando de Aŭstrio, arkiduko kaj sekvanto de la aŭstria-hungara trono, okazis en Sarajevo la 28-an de junio 1914. Jen la komenco de la Unua Mond-milito.

Antaŭ la okazigo de la venonta Universala Kongreso de Esperanto, Montrealo de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto, aperos nova numero de nia revuo *JURA TRIBUNO INTERNACIA*, jam la 21-a numero. Se Vi deziras kunlabori pere de artikolo, eseo, informo, ktp. Bonvolu kontakti kun la redaktantaro de la revuo ĉe la ret-adreso: jurista@esperanto.ac

